# J. ROSTAND

∴

# TIU, KIU NE VOLAS MORTI

Elfrancigis D.C.

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
112 B 1976 1 FF

## Noto de la tradukinto

Jean Rostand estas nun famkonata biologo, filozofo, pacisto; sed dum multaj jaroj li restis preskaŭ nekonata.

Ŝajnis al ni interese prezenti al nia legantaro la junaĝan aŭtoron per tiu peco el lia tria verko "Pendant qu'on souffre encore" (Dum oni plu suferas), aperinta du tri jarojn post la fino de la unua mondmilito.

Forte emociita, indignanta pro la militkrimoj, Jean Rostand esprimas siajn sentojn per dolora ironio, kaj atentigas nin - li tion faros dum sia tuta vivo - pri la sola homo, la individuo.

D.C.

En tiu tempo, ĉiuj mortis, aŭ almenaŭ faris ĉion necesan por morti. Ĉiu, laŭ maniero malsama. Por malsamaj motivoj. Dediĉante sian vivon al sia favorata Idealo. Tiu mortis por la Patrio. Tiu, por la Justeco. Tiu, por ke ne plu estiĝu militoj. Najbaraj cerboj estis loĝataj de la plej malsimilaj ideoj. Personaj kialoj iafoje aldoniĝis al la abstraktaj instigiloj. Unu sentis devon al sia nomo, al sia fido, al sia klano, al sia raso; alia ne plu domaĝis sian vivon depost iu malesperiĝo. Kelkaj maloftaj sinmortigoj enŝoviĝis en la grandegan trupon el sinoferoj.

Certaj improvizis sian morton. Certaj ĝin antaŭpreparis. Certaj, mortante, serĉis sintenon, geston, vorton. Iuj mortis sobre, sen valorigi sin, sen pozo, eĉ ne penante montri sian senmankan spiritliberecon, sen eĉ doni al si la lukson rideti, sen eĉ - fiera heroeco memsufiĉa - degni pruvi, ke ili malŝatas la morton.

Iuj mortis kun kolero, kvazaŭ pro iaspeca defio. Aŭ kun mildeco kaj indulgo. Certaj konsideris la morton kun okulo kvieta kaj lucida. Certaj malpermesis al si pensi, preferante atingi la fatalan momenton kun nebula cerbo. Certaj, kiujn la agonia frosto subite elrevigis el ilia entuziasmo, nur lastmomente komprenis de la afero la kruelecon, kaj forpasis kun melankolio.

Aliaj, flamiĝantaj por nobleco, estis feliĉaj, per sia ofero egaliĝi al la plej grandaj. Aliaj, sciante, ke ili pli bone sin esprimas ĉe sia lasta sekundo ol en tuta vivo, ĝuis finfine senti la guston de sia animo sur sia buŝo.

Estis multaj viroj, kiuj, povante elekti, interŝanĝis komfortan vivon kontraŭ la kadavra sorto. Kiom ajn neebla tio ŝajnas, estis viroj allogataj de la abomeninda perspektivo; kiuj avide serĉis, pro iaspeca animinverso, tiun

morton de kiu oni kutime tiel malespere fuĝas. Estis viroj, kiuj, sen literatura troigo, sen hiperbolo, vere enviis, samkiel en la poemo, la sorton de la por la Patrio mortintoj.

Estis iuj havantaj nomon, personecon, kiuj donis ekzemplon. Kaj estis la sennoma homamaso. Ha ! kiam heroo, mortante, severe fieras profiliĝi sur horizonto, li trovas en tio sovaĝan konsolon. Li estas subtenata de la okuloj, kiuj distingas lin. Lin sekvas, lin servas, lin helpas io el la admiro kaj dankemo de tiuj, por kiuj li sin foroferas. Li sin donacas al sia idealo, kaj lia sinofero havas la gracion de indulga komplezo. Kiam iu kiel Péguy estas mortonta, li scias, ke tio ĉi estas troa. Kaj li certe gustumas ian amaran ebriecon, elmetante al la stulteco de l'pafado sian mirindan cerbon tute bolantan de vortoj kaj ideoj, konjektante, en la momento mem kiam li estas malaperonta, ĉion, kion perdos kun li la universo.

Sed fari la superhoman klopodon morti, eĉ ne povante diri al si, ke oni faras ion eksterordinaran ! Havi eĉ ne tiun iluzian apogilon, tiun gracilan gardrelon el orgojlo por eviti la vertiĝon, malsupriĝante al la abismo ! Morti kiel ĉiuj, kun ĉiuj ! Konsenti pri morto, kiu eĉ ne estus escepto ! Pri morto vulgarigita, fuŝuzita, kiun neniu rimarkas ! Morti, plenumante nur la plej humilan kaj la plej diskretan el la taskoj !

°°°

Meze de tiu diboĉo de heroeco iuj troviĝis, kiuj ne volis, kiuj ne povis morti; kiujn ne sukcesis ekzalti la muzikoj la plej ekzaltaj; kiujn nenia devo, nenia honoro, nenia idealo defendis kontraŭ la instinkto de memkonservado; al kiu nenia imperativo estis sufiĉe kategoria.

Ili baŭmis, ili kalcitris antaŭ la morto. Ili eĉ ne provis fanfaroni. Necesis, ke ilia timo eksteriĝu; silento ne decis al ilia angoro, kiu krakigis la konvenciajn grimacojn de l'kuraĝo. Ili neniel havis inklinon al

martiro. Ĉu pro tro bona aŭ tro malbona sano ? Kelkaj, malfortikaj, ne havis forton por morti. Male ĉe aliaj speciale fortikaj, vigloriĉa vivo rifuzis interrompiĝi.

Tiu malproksimeco de l'Nenio kaŭzis al ili fizikan vertiĝon : kvazaŭ ili trairus abismon sur mallarĝa ponteto.

Ĉu eksceso de l'imago ? Ĉu tiuj malbravuloj - ĉar tiu ĉi ĝenerala nomo ĉiujn inkluzivas, kiuj spertas tro da malfacilo por ne plu esti - prezentis al si kun speciala akuteco, kun preciza detalriĉo la teruran kaj banalan elnodiĝon; tion, kio ĝin antaŭas kaj ĉirkaŭas, la vundon, la agonion; la momenton mem pri kiu oni fine nenion scias; kaj ĉion hidan, kiu ĝin sekvas, la teron, la vermojn, la putradon ?

Ili havis ian specon de vitala manio, de nebridebla mortofobio. Ĉu do ili sentis sin tiel komforte en tiu ĉi vivo, el kiu ili ne volis foriĝi ? Kiam oni konsideris kelkajn el tiuj malbravuloj, oni unuavide inklinis konkludi el ilia malespero, ke ili eltiras el la ekzistado konsiderindan sumon de plezuroj, honoroj, avantaĝoj. Kaj tute ne. Tiu vivo, kiun ili plej persiste obstinis pluigi, estis ordinare viveto nebona, monotona, sterila, sen alta celo, sen granda intelekta intereso, sen ebla granda ĝojo, sen horizonto, unu el tiuj vivoj ne provizitaj de ĉio, kio igas la vivon dezirinda; vivo, fine, kiun oni ne volus. Kaj oni miris, oni ekkoleris, vidante ilin sin rifuzi al la ofero, dum apud ili tiom da rimarkindaj homoj riĉaj, inteligentaj, senpene rezignis feliĉon, monon, ĝojeblojn, glorvirtualecojn. Ili estis escepto, malmulta minoritato. Feliĉe por la homara honoro, pensis la bone harditaj animoj. Ili estis, en la grandioza ensemblo, nur eta hontomakuleto, kiun oni evitis rigardi, aŭ kiun oni malestime montris unu al la alia. En la ĉiesa heroeco, akre mistonis tiuj timulaĉoj. Evidente, en ilia kazo estis io monstra. Patologia, teratologia simptomo, degenera stigmato estis tiu ekstravaganca amo al la vivo. Homo kun normala konstitucio devas morti facile.

Kiuj ilin amis, tiuj ruĝiĝis pro ili, kaj penis kun kortuŝa zorgo maski ilian kriplaĵon per konfeseblaj pretekstoj. Ili serĉis por ili senkulpigojn ŝajne verajn,

kaj se vane, ilin forneis prefere ol solidariĝi kun ili.

Unuanima malestimo tiujn kovris, kiuj kun nekredebla maldeco volis vivi. Estis subkomprenite en tiu epoko, ke ĉiuj viroj indaj je tiu ĉi nomo definitive decidis ne domaĝi sian vivon. Eĉ tiuj, kiuj heroldis sian malamon al la milito pro altaj kaj filozofiaj motivoj, ĉiam singarde klarigis, ke ili ne parolas en sia propra nomo. Oni kompatis la aliajn, neniam sin mem. Oni abomenis mortigi, sed ne morti. Certaj ĉirilate altigis la skrupulon ĝis libervola risko de sia vivo en tiu de ili malbenita milito : tiel, ĉe sia reveno ili povos pri ĝi libere paroli sen elmeti sian opinion al suspekteblo.

Multaj malbravuloj tamen batalis, sed nur truddevige; inertaj kaj pasivaj, ili ne havis tian energion necesan por eviti devon, kiun oni ne kapablas konvene plenumi. Kaj la ĉefoj, naŭzite, ne emis ĵeti sub la mitrajlon tiun kalcitreman karnon. Mi memoras unu el tiuj kompatindaj estaĵoj, mi revidas lian vizaĝon de kondamnito, dum per tremantaj manoj li butonumis sian uniformon. Mi revidas unu alian, tre junan, el la lasta kontingento : li plorĝemis kiel infano, alvokante sian patrinon, en la granda stacidomo de kie oni ekspedis lin al la morto; ĉirkaŭ li neniu estis emociita; oni mokis, oni ridis, kaj oni malmilde juĝis lin.

Estis iuj, kiujn la timo anstataŭ paralizi stimulis, kaj kiuj forfuĝis. Por reatingi la foriĝantan vivon, ili ĉion forlasis : hejmlokon, gepatrojn, amikojn, situacion, bonhavecon. Mi vidis unu el tiuj dezertintoj. Estis en la unua militjaro, funde de Pireneoj, tute apud la landlimo. Ni estis kuniĝintaj iun vesperon sur la polmoluda placo. La viro, hejmen sendita post vundo, devis reiri la morgaŭon. Sed li nepre ne volis remeti la piedojn en la inferon el kiu li estis elirinta. Pri ĝi nur parolante, li tremis, liaj okuloj vagis kiel tiuj de persekutata besto. Li foriros nokte laŭ unu el tiuj montaraj padoj, kiujn li bone konas, ĉar li tie kontrabandis. Li ne kaŝis sian intencon, kiu ĉiujn konsternis kaj afliktis, ĉar oni lin estimis en la vilaĝo, kaj forfuĝo lia estus veinda ekzemplo. Oni provis deadmoni lin

per vortoj solenaj kaj kortuŝaj : la Patrio... la Honoro... la Devo... klarigis oni milde. Poste, ĉar li restis surda, oni iom post iom malaltiĝis al konsideroj malpli noblaj, sed pli rektaj. "Vi havas tie ĉi belan situacion, edzinon, bestojn. Viaj gepatroj estas maljunaj, ilia domo baldaŭ estos via. Kaj vi rezignus ĉion ĉi ! Kia frenezaĵo !"

Sed al ĉio al li dirita, al ĉio elokventa aŭ prudenta, la viro senvarie, nelacigeble, senindulge, kun sia elparolo malrapida kaj aparta, per tiu obstina tono kontraŭ kiu, jam de la unua vorto, oni estus povinta senti, ke ĉio estas vana, la viro respondis :
"Jes, sed mi vivos."

Kaj tio ĉi revenis, kvazaŭ rekantaĵo. Al ĉiu obĵeto kontraŭmetita, al ĉiu el la malhelpoj al li montritaj, li kontraŭis nur per jena respondo :
"Jes, sed mi vivos."

Kaj efektive, kion respondi al tiu respondo ? Kion respondi al tiu certeco de vivo komparite kun la terura risko ? Kion oni nur povis, estis deflankiĝi de la demando, oblikve ĝin trakti. Sed de la momento kiam la alia nepre revenis al tio, kion oni flankenlasis kaj kiu estis por li la ĉefa punkto, la nodo de l'demando; de la momento kiam, esplorante sub la vortoj per kiuj oni provis maski la realon, li malkovris sian morton kaj persistis ne ĝin akcepti, vane oni daŭrigis la diskutadon.

Ĉar la sinteno de tiu, kiu por savi sian vivon senbalastiĝas kaj ĉion forrezignas, ja havas sian logikon. Kial, pro duarangaj motivoj, li konsentus oferi la fundon, la nuran senreplikan realaĵon, la nuran nediskuteblan kaj senteblan havaĵon ? Li sin krampas al tiu trezoro kun la avideco de proprietulo. Kaj kiuj perfide provas persvadi lin, ke endas morti, tiuj ŝajnas al li kvazaŭ frenezuloj aŭ friponoj, kiuj, interŝanĝe de iu falsa mono, pretendus forrabi de li lojalan kaj pezan orbrikon.

Ha ! Kiom da aferoj povas diri al si tiu, kiu ne volas morti ! En kio helpos al li la belaj vortoj kaj laŭdoj pli malpli hipokritaj, kiam li plu estos nur amaso da ostorestaĵoj en necerta loko ? Oni tiam ne plu okupiĝos pri li;

kaj kiuj iam admonis lin al sinofero, tiuj malpeze marŝos sur la tero, ne meditante pri tio, ke sube kuŝas li, tial, ke li sekvis iliajn konsilojn. La unuaranga spritaĵo estas vivi. Kion respondi al tiu, kiu rezonas tiel simplige, tiel proze ? Li staras tie sur punkto malalta sed ne venkoprenebla. Oni diris : ĉu por vivi oni perdu la vivkialojn ? Kvazaŭ vivi ne estus en si jam sufiĉe determinanta kialo ! Kvazaŭ, cetere, oni povus perdi samtempe ĉiujn vivkialojn ! Kvazaŭ ne estus tiom da aliaj kialoj, ke ĉiel, ion ajn oni faru, io ajn oni fariĝu, tiom nombraj estu la de ni perditaj, ili ankoraŭ abunde restus, por vivi kun ĝojo ! Kvazaŭ oni povus per unu fojo malplenigi vivon je ties enhavo !

o
o o

En sia nepra antaŭdecido ne sin pereigi, la malbravuloj iafoje uzis artifikon. Ili penis gajni tempon. Ia ajn rimedo estis al ili bona por elturni sin el la morto. Multvalora por ili estis ĉia prokrasto, kiu malfruigas, kiom ajn malmulte, la fatalan momenton. Ili, tiuj fideluloj, tiuj fanatikuloj de la vivo, akceptis honton, malestimon, pensante, ke ĉia honto, ĉia malestimo valoras ankoraŭ pli ol malekzisto kaj ke nur neniam vidinte kadavron, oni povas ignori la aplomban superecon de la vivantoj.

o
o o

Ha ! Ni insiste rigardu tiujn malŝatindajn virojn, kiujn oni devas perforte konduki al la morto ! Malbravuloj ? facile dirite. Facile farite, ilin malestimi. Ili sendube estus homoj honorindaj, estimataj, se oni ne estus de ili postulinta, ke ili senprepare fariĝu herooj. La homara krimo el ili faris krimulojn. Ĉu ilia kulpo, se tiom da aliaj estas facile sublimaj ? Certe, la heroo nin interesas pli multe; sed ankaŭ ili estas utilaj, kaj bonefike estas ilin rigardi. Oni ne sufiĉe priatentis ilin. Oni ne sufiĉe parolis pri tiuj malfeliĉ-

uloj, kiuj ne scias donaci sian vivon. Ili montras al ni nekutiman aspekton de la morto, ili lumigas alian realecan flankon, ĉar, se la heroo estas admirinda, kiom samtempe li estas oportuna ! Kiom sereniga la vido de viro iranta plenvole morti ! Ni multe preferas, ke tiu, kiu mortas, konsentu sian morton; tiele, li pri ĝi kunkulpiĝas, li ĝin preparas. Ĝin akceptante, li ĝin komencas. Restas nur al li sin donigi de la malamiko la finofaran baton.

Sed la malbravulo, kiu kontraŭvole ricevas la morton, perdante la honoron, maltrankviliĝas nin. Tial, ke lia vivo estas bezonata, ja endas, ke oni forprenu ĝin de li. Oni do superforte forŝiru ĝin. Ni koleras kontraŭ li pro la nervoziga spektaklo, kiun li prezentas al ni. Li ne havas la takton, la galantecon doni sian vivon, tuj kiam oni ĝin petas de li : li tamen ja scias, ke nur ĝustelekte ni ĝin petas; li povus, ververe, meti en la aferon pli da eleganteco !

Ni ĉeestas,ĉe la malbravulo, ŝtelon de iu vivo. Li deviĝas nin kapti ĉe l'freŝa faro la enrompon. Li substrekas, akcentas, daŭriĝas per sia rezistado, la hororon morti, kiun la heroo delikate kaŝas. Kio devus okazi diskrete kaj rapide, tion li senpudore elmontras kaj treniĝas.

Tiu homo ofermortigata malgraŭ si, tiu individuo baraktanta kontraŭ la Patrio, elvokas la buĉatan beston. Li ĝenas nin, li vekas en ni penigajn komparojn. Kie estas nur herooj kontentaj pri sia sorto, tie ne plu estas homa buĉejo. Neniu mezo : kiam la homo ne estas heroo, li estas nur morna besto buĉenda, kiu elŝoviĝas, elglitas el sub la tranĉilo, kaj kiun oni devas revenigi, tenadi sub la klingo.

Ĉiuj niaj certecoj ŝanceliĝas en ĉeesto de unu sola estaĵo, kiu volas vivi. Ekzistas profunda regiono en nia animo, kie ni ne povas ne akcepti tiun deziron tiel modestan kaj naturan, hodiaŭ la plej mistempan el la postuloj. Ni ja sentas, ke inter la plej majestaj ideoj kaj la plej humila vivo restas netransirebla foso, kiun sola povas plenŝtopi la bonvolo de heroo.

Ĉio alkuras por defendi tiun, kiu rifuzas sian vivon. Nia metafizika skeptikismo aliancigas kun nia animala kompato. En la senscia mallumo, kie ni staras, kiel ni kuraĝus aserti la necesecon de ies morto ? Kiam temas pri la vivo, kiu estas la eminente metafizika afero, ĉu ni ne havas la devon, se estiĝas dubo, prokrasti nian juĝon ?

La vivo disvolviĝas en aparta dimensio, kien ne ĝisiras la kolektivaj necesoj. Ĝi transcendas ĉion, kio ne estas ĝi. Sub la homo socia, enmetita en tiujn samcentrajn grupojn, kiuj lin ligas kun la universo : familio, klaso, homaro, patrio; sub tiu homo socia, kiun en kazo ekstrema oni rajtas mortigi, estas alia homo izolita en la universo, la kosma ĝemelo, kiu, fremda al ĉiuj kvereloj, estas neniel solidara nek respondeca pri io ajn; kaj ĉi tiun homon, senkulpan kaj liberan, oni murdas !

Kun la heroo, ni estas trankvilaj : ĉio okazas digne, korekte, pure. Nek batalspuro. Nek perforto. La morto de la heroo ĉiujn senkulpigas. Eĉ la plej suspektindaj havi el ĝi intereson, ne povas esti kompromititaj. Ĝi liberigas nin de pripenso. Ĝi antaùkontraùas ĉiujn kritikojn. Ĝi dispelas ĉiujn dubojn. Ni ĝin admiras, kiel decas, kun entuziasmo. Sed ni precipe dankas ĝin, ke ĝi evitigas al ni ĉian konsciencesploron. Ĝi plej elegante solvas la problemon, aù pli verdire ĝi subtile ĝin evitas. Kia faciliĝo ! Kia simpligo ! Kia senbalastiĝo ! Ĉar la heroo prenas sur sin sian morton, neniu rajtas interveni, komenti pri tio. Li fiaskigas la skandalon. Li bonvolas morti : tio estas lia rajto. Li neniel bezonas tiujn homojn tro kompatemajn, kiuj, pli rojalistoj ol la reĝo, persistas kompati lin, kiam li ne volas kompaton. Li antaùevitas la atencon, kiun oni primeditis kontraù lia persono. Per sia oportuna memmortigo, li faras la murdon superflua. Tiu mirinda komunisto de la vivo sukcesas igi nin forgesi, ke ĉi lasta apartenas, ĉion spite, unuarange al tiu, kiu ĝin posedas.

Jes, ni senhezite rigardu tiujn, kies angoro proklamas la netolereblecon de la morto; tiujn, ĵaluzajn pri la malfirma havaĵo, kiun ni tro facile malestimas, kiuj memorigas al ni ties gravecon; tiujn, kiuj kun terurego

forkuras for de la fumoj de l'entuziasmo, same kiel acerba malsanulo, kiu, timante la operacion, elŝoviĝas el la kloroformo. Tiujn ni rigardu, kiuj malĝoje, malinkline, post la plej brilaj tumultoj vidas nur sian baldaŭan morton. Tiujn ni rigardu, kiuj volas, se ili malaperos, en tio ĉi neniel partopreni kaj lasas la tutan respondecon al la aliaj; tiujn, kiujn oni devas treni al la torturo. Tiujn ni rigardu, kiuj alvenas jam preskaŭ inertaj sur la lokoj, kie oni mortigas. Eĉ la perfidulo, kiun endas ŝnurligi sur seĝo por lin mortpafi, donas al ni nervodoloron. Despli prave ni sentas nin ĝenataj fronte al tiuj viroj senpekaj inter la senpekuloj, ne kulpantaj alian krimon ol vivovolon, kiam ĉiuj mortas.

---==o==---

Gérant & imprimeur : Baudé, 47340 Laroque

Broŝura serio de "La Juna Penso" : F 47340 Laroque Timbaut.
poŝtkonto : La Juna Penso, 3 374 04 M, Bordeaux, Francio.

| | Kelkaj el la disponeblaj broŝuroj | FF |
|---|---|---|
| IE. | An Kaŭ: Initiation à l'espéranto (por francoj) | 1,50 |
| LE. | Lanti: La laborista esperantismo | 1,25 |
| NR. | T.Ebert: Ĉu neperforta revolucio... | 1,25 |
| GL. | Duboin: Granda liberiĝo de l'homoj per scienco | 1,25 |
| EF. | Espéranto en 24 pages (por franclingvanoj) | 1. |
| PE. | Lanti: Pri edukado (el "Vortoj de E. Lanti") | 1,50 |
| EV. | Krishnamurti: Eduko kaj vivsignifo. Rimarki | 1,50 |
| MS. | La Boesi: Memvola servuto | 1,50 |
| RR. | H. Masson: Du rêve à la réalité : l'espéranto | 1,50 |
| EL. | Lanti: El leteroj | 1,50 |
| PP. | Por la paco, kontraŭ la milito (citaĵoj) | 1,25 |
| EH. | Esperanto en 24 páginas (por hispanlingvanoj) | 1. |
| NP. | S.J.Lec: Nekombitaj pensoj | 1,25 |
| RS. | J.Burger: Rido sanigas! | 1,50 |
| LP. | La liberecana penso (citaĵoj) | 1,25 |
| AO. | Malatesta: Anarkio kaj organizo | 1,25 |
| AB. | Lanti: Absolutismo (prelego) | 1. |
| NM. | Tolstoj: Ne mortigu! | 0,50 |
| PI. | P.Lafargue: La rajto de pigro | 1,50 |
| HP. | E.Relgis: La humanitaristaj principoj | 1,25 |
| PC. | Bellamy: La parabolo pri la cisterno | 0,75 |
| DU. | Pario: Durruti, simbolo de la hispana revolucio | 1,25 |
| PT. | Domela Nieuwenhuis: La piramido de l'tiranismo | 1,50 |
| PO. | A.Cohen: Paco en proksima oriento | 1,25 |
| CM. | HD.Thoreau: Civila Malobeemo | 1,25 |
| AC. | R.Levreaud: Atomcentraloj (debato) | 1,25 |
| TM. | Alfa-Beta: Tra la mondo per biciklo kaj esperanto | 1,50 |
| HM. | A.Pannekoek: Historia materiismo - Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado | 1,25 |
| KE. | Han Riner: La Kvina Evangelio | 6. |
| HH. | Lanti: Herezulo - Herezaĵo | 1,50 |
| MV. | Bartelmes: Mia vivo - Dek artikoloj | 2,50 |
| IM. | Han Riner: Individuista Manlibreto | 1,50 |
| LV. | Fontaura: Liberecanaj vivkonceptoj. J.Grav: En anarkista socio, kiel kondutos la individuo ? | 1,25 |
| NA. | R.Luksemburg: Naciecaj problemoj | 1,50 |
| HT. | Bazalgette: Henry-David Thoreau | 1. |
| KD. | Sébastien Faure: La krimoj de Dio | 1,50 |
| TH. | J.Ingenieros: La triviala homo | 3,50 |
| RA. | Kropotkin: Revolucia registaro aŭ anarkio ? | 1,50 |